



S-ro RUFINO UNZAGA

Bilbao

LA SUNO HISPANA *

ENHAVO: 1. 2.^a Universala Kongreso Esperantista de Genevo.—2. Biblioteko de LA SUNO HISPANA.—3. Kiel oni devas elparoli hispane «Jaguar» au «Yaguar», trad. N. Maclean.—4. Sciigoj.—5. Bibliografio.—6. Pensoj, trad. V. Inglada.—7. Anoncoj.

2.^a Universala Kongreso Esperantista en Genevo

La glora sukceso atingita de la Geneva Kongreso plene deŝiras la estontecon vualon. Pli ol neniam ni povas certigi la universalan triumfon de nia homamideo, kiu vere superrekompencos ĉiujn niajn laborojn, ĉiujn niajn dezirojn kaj sperojn. Supren la koroj, esperantistoj!!

Post jara laborado fine alvenis, kiel supera apoteozo, nia 2.^a Kongreso. Meritplena estas la agado de niaj samideanoj, kiuj ne malŝparis la tempon dum la unua jaro de oficiala vivo de nia kara lingvo. De la Bulonja al la Geneva Kongreso nur pasis unu jaro, sed kiom kreskis kaj distingiĝis nia afero!

El glorioso éxito alcanzado por el segundo Congreso en Ginebra rasga por completo el velo del porvenir. Hoy más que nunca podemos asegurar el triunfo de nuestra idea humanitaria, que verdaderamente recompensará con creces todas las molestias, todos los trabajos, todos nuestros deseos y nuestras esperanzas. ¡Arriba los corazones, esperantistas!!

Después de un año de continuada labor llegó por fin, como suprema apoteosis, nuestro segundo Congreso. Admirable labor la de nuestros *samideanos*, que no han perdido el tiempo durante el primer año de vida oficial de nuestra querida lengua. Desde el Congreso de Boulogne hasta el de Ginebra no ha trans-

Kuraĝe antaŭen, ĝis atingo de la dezirita celo!

LA SUNO HISPANA tutkore aliĝas al la ĝojo esperantista, gratulante la organizin-toj de la Kongreso.

Ĝi sendas respektplenan saluton al nia karega majstro, doktoro Zamenhof kaj al la tuta esperantistaro, okaze la sukceso de nia 2.^a Kongreso.

* * *

Dank'al ĉeestado de du el niaj redaktoroj, Pastro Guinart kaj sinjoro Ayza, ni povas prezenti al niaj gelegantoj, en tiu kaj sekvantaj numeroj, plenan raporton pri tiu eksterordinara okazo. Nepre trafronte niaj ekskursantoj Barcelono ili penis por sin unuigi kun S-ro Alfonso Sabadell, prezidanto de la Grupo Esperantista Barcelona, pri kiu oni sciis ke li ĉeestos la Kongreson kune kun lia edzino. Vere estis tutkora kaj frata la akcepto de sinjoro Sabadell por la valenciaj esperantistoj. La sciigo tie ricevita, pri la alveno en la morgaŭna tago de S-ro Norman Maclean, prezidanto de la Murcia Grupo, ankaŭ akompanata de sia edzino, decidis la hispanajn kongresanojn pasigi tiun nokton en Barcelono kaj ili ne pentis. La cirkonstanco, ke S-ro Sabadell havas bonegan fonografon kun cilindroj impresitaj de Boirac, Fruitier, Copée, Inglada kaj aliaj eminentaj esperantistoj havigis al niaj amikoj, bonan vesperon, dum kiu ili ricevis plej delikatajn kontentigojn el la tuta familio. S-ro Sabadell elmontris siajn dezirojn posedi cilindron impresitajn de ĉiu el la siaj gastoj, kaj ĉiu volente konsentis.

Kiam alvenis gesinjoroj Maclean kaj oni organizis la ekskurson, ĉiuj forlasis Barcelono kaj ni preterlasas la serion a gradoj impresoj ricevitaj precipe de

currido más que un año; mas, ¡cuánto ha crecido y se ha divulgado nuestra causa! ¡Adelante con arrojo, hasta la consecución de nuestro deseado objetivo!

LA SUNO HISPANA, de todo corazón se une á la alegría de los esperantistas, felicitando á los organizadores del Congreso.

Su Redacción envía un respetuoso saludo á nuestro querido maestro el doctor Zamenhof y á todos los esperantistas, con motivo del éxito alcanzado por el segundo Congreso.

* * *

Merced á que han asistido á él dos de nuestros redactores, el P. Guinart y el Sr. Ayza, podremos ofrecer á nuestros lectores, en este número y sucesivos, una relación detallada de tan extraordinario acontecimiento. Teniendo que pasar nuestros excursionistas necesariamente por Barcelona, trataron de unirse al señor D. Alfonso Sabadell, presidente del Grupo Esperantista de Barcelona, del cual sabían ya que había de asistir al Congreso acompañado de su señora. Grandes fueron, en verdad, las muestras de atención y de cariñoso afecto con que fueron recibidos por el Sr. Sabadell los esperantistas valencianos. La noticia recibida allí de que llegaba al día siguiente, también acompañado de su señora, el Sr. Norman Maclean, presidente del Grupo de Murcia, en dirección á Ginebra, decidió á los congresistas españoles á pernoctar aquella noche en Barcelona, y á fe que no tuvieron por qué arrepentirse. La circunstancia de poseer el Sr. Sabadell un magnífico fonógrafo con cilindros impresionados por Boirac, Fruitier, Copée, Inglada y otras eminencias del Esperantismo, proporcionó á nuestros amigos una excelente velada, después de haber recibido los más delicados obsequios de toda la familia. El Sr. Sabadell manifestó sus deseos de poseer un cilindro impresionado por cada uno de los huéspedes, á lo cual accedieron ellos gustosísimamente.

Llegados los Sres. Maclean y organizada la expedición, abandonaron todos Barcelona: pasamos por alto la serie de agradabilísimas impresiones recibidas,

la Naturo dum vojaĝo farita en la plej bonaj kondiĉoj pri rapideco kaj oportuneo en la longa interspaco de Barcelono ĝis Macono, kie la vojaĝantoj forlasis la vagonaron atendante tiun, kiu de Parizo pasis tra tie je la dua matene al Genevo.

Ili jam portis sur la brusto la verdan stelon, kiu malgraŭ la duonombro reĝanta en tiu parto de la bordmarŝejo estis ekvidata de anglo, S-ro Marechal, kiu aminde demandis ilin Esperante: ĉu vi estas esperantistoj? Nedirebla estas la ĉiesa ĝojo, kiun ili manprenis sin kiel fratoj kaj ekinterparolis intime, ĉar sinjoro Marechal, simpatia belkreska junulo rapidis prezenti al ili sian junan edzinon kaj sampatrujan profesoron maturaĝan, kiu ilin akompanis. Eniĝintaj en la unua esperanta interparolado kun fremduloj, niaj amikoj pasis antaŭ la pordo de restoracio, kie multenombra grupo de vojaĝantoj manĝetis. Sed kiam la grupo rimarkis la esperantistojn, ĉiuj leviĝis, kvazaŭ per risorto, el la seĝoj kaj kuris ĉirkaŭpremi varme siajn novajn kunvojaĝantojn.

Alveninte Avinjonon, la esperantistoj tute plenigis jam kelkajn vagonojn. Tie estis kie per la unua fojo aŭdiĝis la ekkrio: vivu Esperanto!, kiu bruege resonissub la vitraj apsidoj de la stacidomo. Kaj kiam ili forlasis la vagonaron en Genevo estis tia la nombro de personoj montrantaj sur la brusto la verdan stelon, ke oni jam povis antaŭdiri la grandan sukceson de la Kongreso. La enloĝigo fariĝis sen ia malfacilaĵo. Genevo, kiu enhavas centojn da hoteloj kun centoj de ĉambroj, ne bezonis sin pretigi. El 150.000 loĝantoj de tiu urbo, 40.000 estas turistoj fremdaj, kiuj senĉese iras admiri la belecon de la urbo kaj la ĉarmojn de la lando. Tial, momente, malaperis tiu grupo da esperantistoj, sed ne tute, ĉar baldaŭ de la omnibuso oni vidis ondiganta sur la *Hotel de la Poste* la esperantistan flagon, netrompa pruvo ke tie loĝas gran-

sobre todo de la naturaleza, durante un viaje hecho en las mejores condiciones de rapidez y comodidad en el largo trayecto que hay desde Barcelona hasta Macón, donde los expedicionarios dejaron el tren para esperar el que desde París pasaba por allí á las dos de la madrugada en direcci6n á Ginebra.

Llevaban ya colocada sobre el pecho le verde estrella que, á pesar de la penumbra que reinaba en aquel punto del andén, fué notada por un inglés, el señor Marechal, quien con mucha amabilidad les preguntó en Esperanto:—¿Son ustedes esperantistas?—Indecible fué la alegría de todos al estrechar sus manos como hermanos y trabar íntima conversaci6n, pues al Sr. Marechal, joven simpático de gallarda estatura, le había faltado tiempo para presentarles á su joven esposa y á un profesor de su naci6n, hombre ya de alguna edad, que les acompañaba. Abstractos con la primera conversaci6n en Esperanto que tenían con extranjeros hubieron de pasar por la puerta del restaurant, donde un grupo numeroso de viajeros tomaba su refrigerio. Mas al notar el grupo de los esperantistas, movidos como por un resorte dejaron á una las sillas y corrieron á abrazar con efusi6n á sus nuevos compañeros de viaje.

Llegados á Aviñ6n, los esperantistas llenaban ya algunos vagones por entero. Allí fué la primera vez que se oyó el grito de: ¡viva el Esperanto!, y que sonó ruidosamente bajo las vitreas bóvedas de la estaci6n. Y cuando en Ginebra abandonaban el tren era tal el número de personas que ostentaban en el pecho la estrella verde, que hacía ya augurar prematuramente el gran éxito del Congreso. El hospedaje se efectuaba sin dificultad alguna. Ginebra, que posee centenares de hoteles con centenares de habitaciones cada uno, no necesitó prepararse. De los 150.000 habitantes que tiene esta ciudad, los 40.000 son turistas extranjeros que van de continuo á admirar la belleza de la ciudad y los encantos del país. Por eso de momento quedó como eclipsado aquel núcleo de esperantistas; más no del todo, porque muy pronto desde el óm-

dan nombron. Alia esperantista flago ornamis la belan facadon de la *Hotel de l'Ecu*, kiam jam estis adveninta la klera aŭtoro de Esperanto, D-ro Zamenhof, akompanata de sia frato.

La jena Honora Komitato fondiĝis okaze la Kongreso: Henri Jasi, prezidanto de la Stata Konsilano; Berlie kaj Victor Charmonet, ŝtataj konsilanoj; Advierend Lachend, nacia deputato; Ernest Naviele, el la Franca Instituto; J. Westheimer, J. J. Gourd, Paul Motiand, Henri Jehz, Henri Mercier kaj Luis Choelat, universitataj profesoroj; Luis Bertrand, direktoro de la Komerca Lernejo, Tiu Honora Komitato ne povis esti pli bone elektita, ĉar ĉiuj ĝiaj anoj estas regantaj homoj kaj scienculoj plej famekonataj.

En la publikaj anoncoj, estis grandaj anoncoj arte presitaj, kiuj vokis la publikon al Kongreso kaj al Esperanta Ekspozicio. Ĉe la ĵurnalaj vendejoj oni vidis en prefera loko gazetojn kaj revuojn esperantistajn. Tiel, do, kvankam ne tute plenigis Genevon kiel okazis en Bulonjo, la esperantistoj multe bruegis por ke ĉiu indiferentulo, kiu tiam tie sin trovis, surpriziĝis kaj miris.

Sed ni sekvu niajn samlandanojn, kiuj sin direktis tra la strato de Generalo Dufour al Komerca Lernejo, kie sidis la Ĝenerala Sekretariejo de la Kongreso. La strato estas belega, pura kaj larĝa, kiel preskaŭ ĉiuj de la popolhava urbo, modelo de pureco, kies tero tre bone povas konkuri kun tiu de niaj plej bonaj promenejoj.

Ekstere, la Komerca Lernejo estas ŝtona granda konstruaĵo; interne, belega ŝtuparo imperia alkondukas en ĉiujn ĉam-

nibus se divisaba ondear sobre el *Hotel de la Poste* la bandera esperantista, señal inequívoca de que allí se albergaba gran número de ellos. Otra bandera esperantista adornaba la hermosa fachada del *Hotel de l'Ecu*, donde había llegado ya el esclarecido autor del Esperanto, doctor Zamenhof, acompañado de su hermano.

Un comité de honor habíase constituido con motivo del Congreso, formado por Henri Jasi, presidente del Consejo de Estado; Berlic y Victor Charmonet, consejeros de Estado; Adrien Lachend, diputado nacional; Ernest Naviele, del Instituto de Francia; J. Westheimer, J. J. Gourd, Paul Motiand, Henri Jer, Henri Mercier y Luis Cholet, profesores de la universidad; Luis Bertrand, director del *Colegio*, y Mr. Jiro, director de la Escuela de Comercio. Este comité de honor no podía estar mejor elegido, pues todos sus miembros son hombres de Estado y personalidades científicas de lo más saliente.

Había en los puntos de anuncios públicos grandes carteles artísticamente impresos que anunciaban al público el Congreso y la Exposición esperantistas. En los kioscos de periódicos se veían en lugar preferente periódicos y revistas esperantistas. De modo que aunque no llenaron por completo Ginebra, como sucedió en Boulogne, hicieron los esperantistas bastante ruido para que ninguno de los indiferentes que entonces se encontrasen allí dejase de sorprenderse y llenarse de admiración. Algún establecimiento había también donde se leía el rótulo: «Se habla Esperanto».

Pero sigamos a nuestros paisanos que se dirigen por la calle del General Dufour a la Escuela de Comercio, donde está instalada la Secretaría general del Congreso. Es la calle hermosa, limpia y despejada, como casi todas las de la populosa ciudad modelo de limpieza, cuyo suelo puede competir muy bien con el de nuestros mejores paseos.

Es la Escuela de Comercio, en lo exterior, un edificio magnífico de piedra; en lo interior, una soberbia escalera impe-

brojn, pri kiuj ni nur diros, ke ili estas aranĝitaj kiel decas en lando estanta la unua pri lernejoj. Tien oni eniras, vole-nevole, kun respekto kaj miro.

Nenece estas demandi, ĉar en la facado vasta esperantista flago, kiun la vento gracie ondigas, montras ke tie estas, kaj kvankam iu dubus, sur la granda pordo, oni legas: 2.^a *Kongreso esperantista*.—*Sekretariejo*.

Sube de la granda ŝtuparo ĉiu esperantista estas sciigita en sia kara lingvo, ke estas malpermesate fumi en la konstruaĵo. Maldekstre de la koridaro, en la unua etaĝo, oni trovas la belegan salondon, kie sidas la Sekretariejo. Kaj vidinda estas la ordo per kiu estas klasigitaj la laboroj laŭ apartaj skribo-tabloj kun afiŝoj montrantaj ilfan rolon: *Reklamacioj, Verdaj kartoj, Novaj enskriboj, Gazetaro, Stenografaj laboroj, Ekskursoj Svisaj, Festenaj biletoj, korespondado, k. c., k. c.*; kaj tiuj junuloj tiel amindaj el Organiza Komitato, kiuj tiel lerte helpis ĉiujn enirantojn, povis doni per sia ekzemplo mirindajn lecionojn al multaj oficistoj publikaj kaj privataj.

(*Daŭrigota.*)

rial conduce á todas las dependencias, de las cuales sólo diremos que están montadas como corresponde al país que va á la cabeza del mundo en establecimientos de enseñanza. Allí entra uno, aun sin proponérselo, con respeto y veneración.

No es menester preguntar, pues en el frontis la bandera esperantista de grandes proporciones que el viento despliega con gracia indica que allí es, y si alguna duda pudiera tenerse, sobre la gran puerta se lee: 2.^o *Congreso universal de Esperanto*.—*Secretaría*.

Al pie de la gran escalera todo esperantista es advertido en su querida lengua que no se permite fumar dentro del edificio. A mano izquierda del corredor en el primer piso encuéntrase el magnífico salón donde está instalada la Secretaría. Y es de ver el orden con que están clasificados los trabajos en diferentes mesas-escritorios con rótulos que indican su objeto: *Reclamaciones, Tarjetas verdes, Nuevas inscripciones, Prensa, Trabajos estenográficos, Excursiones por Suiza, Billetes para los banquetes, Correspondencia, etcétera, etc.*; y aquellos jóvenes tan amables, del seno del Comité organizador, que con tanta soltura despachan con delicada atención á todos cuantos se presentan, podrían dar con su ejemplo admirables lecciones á muchos empleados de oficinas públicas y privadas.

(*Continuad.*)

BIBLIOTEKO DE «LA SUNO HISPANA»

La Kuracisto per batoj

(EL MÉDICO Á PALOS)

Fininte la publikigadon de tiu Moratin'a verko tradukita Esperanten de nia eminenta kolego S-ro Vicente Inglada, de nun ĝi, aparte bindita, estas aĉetebla en tiu ĉi Redakcio po 50 centimoj ekzemplero.

Terminada la publicación de esta obra de Moratín, traducida al Esperanto por nuestro eminente colega D. Vicente Inglada, desde ahora, en tomo aparte, puede adquirirse en esta Redacción á 50 céntimos el ejemplar.

Kiel oni devas elparoli hispane «Jaguar» aŭ «Yaguar»?

Diras «Jaguar» ĉiuj libroj pri natura historio, kiuj estas uzataj en nia lando, kaj per *j* skribas ankaŭ la nomon la Vortaro de l' Akademio; sed ni diru, ne volante iel ofendi la saĝegan Societon, ke estas pli prava diri kaj skribi «yaguar». Laŭ la Vortaro mem, tiu vorto estas amerika kaj en efeko ni devas ĝin al la indianoj guaraniaj, sed okazas ke tiuj ĝentilaj sovaĝuloj ne diras jaguar sed yaguar kaj pli ofte ya-guarete.

La glora naturisto hispana Felix de Azara, kiu studis en la sama lando la bestaron de Paraguay, kaj pri ĝi eldonis en la komenco de la pasinta centjaro du bonegajn verkojn, devis aŭdi pli ol unu fojon la nomon de l' besto ĉe buŝo de tiu gento, kaj sekve li skribis la *y* kiel ĝian komencan literon. Tamen pro la famo de tiuj verkoj ili meritis esti tradukitaj france, kaj al la tradukinto ŝajnis bone prezenti la sonon *ya* per *ja*, afero tute natura kaj logika en lingvo franca. Sammaniere skribis kaj skribas angloj ĉar ilia *j* havas sonon similan je tiu de nia *y*, kvamkam pli forta; sed en lingvo hispana kie la du literoj sonas tiel diference ne estas rajta tia ŝanĝo.

Nu, la plej granda nombro el libroj pri natura historio eldonitaj ĝis hodiaŭ en Hispanujo estas tradukoj (ĝenerale malbonaj), aŭ aliformaĵoj (preskaŭ ĉiam pli malbonaj), de verkoj fremdlingvaj, kaj tiuj kiuj tradukis aŭ aliformis, ĉar ili kredeble sciis malmulte pri Zoologio, kopiis la nomojn *ad piedem litteræ*, ne zorgante pri ilia deveno nek pri afero ia inda je atento; jen estas la kaŭzo de tiuj ĉi kaj multaj aliaj eraroj, estante plej granda domaĝo ke lingvistoj kaj verkistoj eminentaj kredis pli granda la aŭtoritaton de tiuj tradukistoj ol tiu de l' zoologisto hispana kiu igis popola en Eŭropo la vorton «yaguar».

Oni povas kompari la eraron al tiu kiun oni farus skribante «Don Quixote» nur ĉar fremduloj skribas ĝin tiel. Pri eraroj de la sama speco oni povas citi mil okazojn, sed sufiĉu nur unu. Ekzistas en Afriko antilopo kiun la Hotentotoj nomas *ñu*, kaj per tiu vorto la Eŭropanoj nomas ĝin nuntempe. Sed oni scias ke la alfabeto franca ne enhavas *ñ*, kaj por prezenti tiun sonon francoj uzas la kuniĝon *gn*, kaj tial skribas *gnu*. Nu, en ĉiuj verkoj hispanaj pri zoologio oni vidas la saman vorton, *gnu*. Eldiru ĝin laŭ nia maniero kaj vi ricevos vorton kiu, krom la granda gorĝa peno kiun ĝi bezonas, ne troviĝas en lingvo ia, nek la Hotentotoj mem povus ĝin kompreni. Kontraŭdiru do, kiu volas «yaguar» kaj «ñu» estas, kaj oni devas diri ĉiam yaguar kaj ñu en hispana lingvo.

N. MACLEAN.

Sciigoj

Laŭ letero de ni antaŭ nelonge ricevita, eminenta hispana, S-ro Juan de La Cierva, advokato kaj eksministro de Publika Instruado, konsente aliĝos al Patronado de Esperanto en Hispanujo.

Ne estas necese rimarkigi al niaj legantoj la gravecon de tiu aliĝo pro kiu ni gratulas la samideanojn, kiuj ĝin atingis.

Vigo.—La 26^{an} de Aŭgusto lasta okazis kunveno de tre gravaj personoj de tiu ĉi urbo por pritrakti la fundamentojn pri la fondiĝo de la Viga Grupo Esperantista.

S-ro J. Seijas, el Castellón, sciigas nin ke baldaŭ oni fundos tie esperantista Grupon kaj en longa raporto ankaŭ pritraktas alian gravan decidon de la Castellon'a urbestro, en kies oficiala kunsido sinjoro Aparici proponis ke oni instruu en la publikaj lernejoj la helpan lingvon Esperanto vaste pritraktante pri la facileco kaj superaj kondiĉoj de la suprenomita lingvo. S-ro Selma trovis tre laŭdinda la proponon de S-ro Aparici, sed atentigis siajn kunvenantojn ke por atingi ĝin estas necese sendi pripeton al sinjoro Ministro de Publika Instruado. Oni aprobis la proponon de S-ro Aparici kun la aldono de sinjoro Selma.

Ni gratulas niajn samideanojn el Castellón por la triumfo atingita.

Jen la artikoloj pri Esperanto publikigitaj en la hispanaj ĵurnaloj:

S-ro Codorniu: «Por kio taŭgas Esperanto» kaj «Ideala Popolo», en *La Verdad*, de Murcia. Ankaŭ aperis kun la sama subskribo kvin artikoloj en *La Verdad* kaj en *El Liberal*, de Murcia, titolitaj «Pri la Geneva Kongreso».

S-ro Monteagudo: «Pri la Geneva Kongreso», en *La Voz de Galicia*, de la Coruña.

Según carta que recibimos hace unos días, un eminente español, el Sr. D. Juan de La Cierva, abogado y ex ministro de Instrucción pública, se adhirió al Patronato de Esperanto en España.

No es necesario llamar la atención de nuestros lectores sobre la importancia de esta adhesión, por la cual felicitamos á los correligionarios que la han conseguido.

Vigo.—El día 26 del pasado Agosto tuvo lugar una reunión de personas caracterizadas de dicha localidad para tratar de las bases para establecer allí el Grupo Esperantista de Vigo.

El Sr. D. José Seijas, de Castellón, nos comunica que pronto se fundará allí un Grupo Esperantista, y en una larga relación trata de otra decisión importante del Ayuntamiento de Castellón, en cuya sesión oficial el Sr. Aparici propuso que se enseñe en las escuelas públicas la lengua auxiliar Esperanto, extendiéndose sobre la facilidad y sobre las excelentes condiciones de dicha lengua. El Sr. Selma encontró muy laudable la proposición del Sr. Aparici; mas hizo observar á sus colegas que, para conseguirlo, era indispensable elevar una instancia al señor ministro de Instrucción pública. Se aprobó la proposición del Sr. Aparici con la enmienda del Sr. Selma.

Felicitamos á nuestros amigos de Castellón por el triunfo alcanzado.

He aquí los artículos sobre Esperanto en los periódicos españoles:

Sr. Codorniu: «¿Para qué sirve el Esperanto?» y «Pueblo ideal» en *La Verdad*, de Murcia. También aparecieron con la misma firma cinco artículos en *La Verdad* y en *El Liberal* de Murcia titulados «Sobre el Congreso de Ginebra».

Sr. Monteagudo: «Sobre el Congreso de Ginebra», en *La Voz de Galicia*, de la Coruña.

S-ro Saralegui: «Pri la Esperantista Kongreso», en *El Eco de Cartagena*.

S-ro Otero García: «Korespondadoj el Genevo» du artikoloj en *La Gaceta de Galicia*, de Santiago.

S-ro Aya: «Pri la Kongreso», «Korespondadoj el Genevo», kelkaj artikoloj en *La Correspondencia de Valencia*.

S-ro Glandre: «Kongreso Esperantista» en *El Porvenir*, de Cartagena.

R. S.: «Nuntempaĵoj», «La Geneva Kongreso», en *El Imparcial*, de Madrid.

S-ro Zamacois: «Esperanto», en *El Nuevo Mundo*, de Madrid.

Anonima: «Dua Kongreso Esperantista» en *Heraldo de Madrid*.

Anonima: «La Esperantismo», en *A B C*, de Madrid.

S-ro Bravo del Barrio: «Pri la Kongreso» en *El Universo*, de Madrid.

S-ro Unzaga: «Al Komercestoj», en *La Gaceta de Galicia*, repesita en multenombraj ĵurnaloj.

S-ro Codorniu: «Bibliografia artikolo» en *La Verdad*, de Murcia.

Sr. Saralegui: «Sobre el Congreso Esperantista» en *El Eco de Cartagena*.

Sr. Otero García: «Correspondencias de Ginebra», dos artículos en *La Gaceta de Galicia*, de Santiago.

Sr. Aya: «Sobre el Congreso», «Correspondencias de Ginebra», varios artículos en *La Correspondencia de Valencia*.

Sr. Glandre: «Congreso Esperantista» en *El Porvenir*, de Cartagena.

R. S.: «Actualidades.—El Congreso de Ginebra, en *El Imparcial*, de Madrid.

Sr. Zamacois: «El Esperanto», en *El Nuevo Mundo*, de Madrid.

Anónimo: «Segundo Congreso Esperantista», en el *Heraldo de Madrid*.

Anónimo: «El Esperantismo», en *A B C*, de Madrid.

Sr. Bravo del Barrio: «Sobre el Congreso», en *El Universo*, de Madrid.

Sr. Unzaga: «Al Comercio», en *La Gaceta de Galicia*, copiada en numerosos periódicos.

Sr. Codorniu: «Artículo bibliográfico» en *La Verdad*, de Murcia.

Bibliografio

Don Juan aŭ la ŝtona festeno, kvinakta komedio de Molière (Moljero).—Tradukis Emile Boirac, rektoro de la Dijona Universitato.—Hachette kaj K.º, Parizo.

Bela kaj korekta traduko, kies legadon, tre agrabla al ni, ni rekomendus al niaj legantoj, se nur la nomo de la tradukinto ne estus la plej bona rekomendo por ĉiu esperantisto. S-ro Boirac, kiu atingis unu el la plej eminentaj lokoj ĉe la esperantistoj kaj prezidas la Lingvan Komitaton, estas *klasikulo*. Liaj verkoj, do, ne nur vokas la atenton de la legantoj pro la intereso de la raporto, sed ankaŭ pro lia korekta kaj facilflua stilo vere imitinda.

La verko apartenas al Kolekto aprobita.

Determinación de las coordenadas geográficas de los lugares del Perú.—Publicación de la Escuela de Ingenieros.—Lima.

Teorema de Nicómaco.—Sociedad «Imprenta y Litografía Universo».—Santiago de Chile.

Hacemos gustosísimos mención de estas obras, porque con ello encontramos favorable ocasión para rendir un entusiasta tributo de admiración y respeto á nues-

tro eminent *samideano* el Dr. Federico Villarreal, presidente de la Sociedad Esperantista Peruana.

Dentro del campo científico, las obras que acaba de publicar tienen verdadera importancia. La primera de las citadas, porque aunque de aplicación inmediata á los lugares del Perú pueden aplicarse sus métodos á lugares cualesquiera de la tierra, mediante las variaciones correspondientes en longitudes y latitudes, y la segunda porque resuelve de una manera general y completísima la propiedad matemática que encierra el *Teorema de Nicómaco*.

Felicítamos sinceramente al Dr. Villarreal por la publicación de dichas obras, que esperamos serán leídas con interés por los amantes de las ciencias exactas.

La Revuo (Vidu anoncon).

Korege ni salutas la aperon de tiu bonega revuo, al kiu ni deziras longedaŭran vivadon.

Tre interesa estas ĝia unua numero, ĉar krom la Zamenhofa traduko de la komedio «La revizoro» ni legis interesajn rakontojn kaj poeziojn de niaj eminentaj samideanoj sinjoroj Menil, Inglada, d' Aulnaye kaj Boirac. La legado de la nova esperantisto, kiu povos ellerni nian lingvon per atenta studado de la verkoj publikigataj en ĝiaj multenombraj paĝoj.

Eldono de la dramo «Wilhelm Tell» en Esperanto.—Prezo 1'50 fr.

La fama multjara esperantisto sinjoro L. E. Meier en Münchén dediĉis al la Svisa Esperanta Societo, kiel signon de sia amo de Svislando kaj sia sindono al la afero de Esperanto, okaze de la dua universala Kongreso de Esperanto en Genevo, mirindan tradukon de la konata dramo *Wilhelm Tell* de Schiller. La Svisa Esperanta Societo, dankege kaj entuziasmege akceptinte tiun ĉi gravegan verkon unuanime dediĉis, presigi la dramon por prezenti signon de sia simpatio kaj amikeco al la tutmonda samideanaro, ĉar tiu ĉi dramo, montrante la ekzistadon de la svisa nacio, certe estas tre interesa kaj entuziasmiga memorajo por ĉiuj esperantistoj. Sin turnu al prezidanto de Svisa Societo, Fr. Schneeberger, pastro, *Laufen* (Berna).

Esperanto et Croix-Rouge, verkita de leŭtenanto Bayol, instruisto ĉe la Speciala Militista Lernejo de Saint-Cyr.—Paris. Presa Esperantista Societo.

Duoblan gravecon enhavas la verko sub tiu ĉi titolo ĵus publikigita de nia fervorega samideano leŭtenanto Bayol, famkonata propagandisto de nia lingvo ĉe la franca armeo.

Ĝi celas precipe la disvastiĝon de Esperanto ĉe la tutmondaj militistoj kaj ruĝkruculo, kaj de tiu vidpunkto la verko estas tre laŭdinda ĉar la gramatika parto, mallonge sed facilerneble klarigata, sufiĉas por ke mezinstruita persono povu paroleti nian helpan lingvon kaj eltiri profiton el la frazaro kaj vortaro, kiuj ĝin akompanas, ebligante la necesan interkompreniĝon inter diverslingvanoj, kvankam ili nur lernos la lingvon dum militiro. Sed, krom la ekpuŝo ke tiu verko donos al nia afero, ne estas malpli konsiderinda ĝia bonfara celo.


Ni esperas, ke la Ruĝkrukulaj Societoj tutkore akceptos verkon, kiu tiel bone povas faciligi ilian kuracan oficon.

Esperanto et Croix-Rouge, originale verkita en franca lingvo estas diverslingve tradukota.

El la historio de Esperanto. Tiu ĉi broŝureto enhavanta la *leteron pri la devenon de Esperanto* kaj la paroladojn de D-ro L. Zamenhof kaj D-ro Kazimierz Bein (Kabe)

en la 1.^a Kongreso de Esperantistoj en Boulogne-sur Mer, 1905, estas aĉetebla po 35 centimoj ĉe S-ro Th. Cejka., Bistrice-Hostyn, Moravio, Aŭstrujo. Kiu mendos almenaŭ 10 ekz., ricevos 1 ekz. senpage.

R. DUYOS.



Pensoj

La vento alblovas ĉiam al plej altaj suproj: tute samĉe—la envio.

VIRGILIO.

Se Satano povus ami, li ĉesus esti malbona.

SANKTA TEREZO.

Gazetaro estas la spegulo de la publikopinio, kiel maro estas la spegulo de ĉielo.

RUBIO.

La poezio, la klereco kaj la filozofio estas termometro, kronometro kaj barometro de la civilizacioj.

ROBERT.

Amo plaĉas pli ol edzeco, tial ke romano estas pli amuza ol historio.

CHAMBFORT.

La virino estas pli ol anĝelo, ĉar ŝi estas patrino.

CASTELAR.

Se oni bone atentas, inter ĉiuj bestoj la kato, muŝo kaj virino estas tiuj, kiuj perdas pli da tempo en sinornamado.

NODIER.

Al du genuoj de virino oni povas apliki la belan maksimumon: «kuneco faras fortecon».

LEMONTIER.

La religio estas orĉeno per kiu Tero pendas de la trono de Eternulo.

HOMERO.

Virino estas kiel ombro: se ni ŝin postiras, ŝi forkuras; se ni forkuras, ŝi nin postiras.

CHAMPFORT.

Dio faris virinon... kaj ripozis.

MAHOMETO.

Edzo estas ĉiam talenta viro: li neniam havas ideon edziĝi.

DUMAS.

Virino mokas virojn kiel, kiam kaj dum ŝi volas.

BALZAC.

Melankolio estas la plezuro esti malgaja.

DUMAS.

Preskaŭ ĉiuj agoj de politikuloj devenas de virinoj.

S.^{RINO} DE GIRARDIN.

Plena homo konsistas el viro kaj virino.

MANU.

Se la nazo de Kleopatro estus estinta unu centimetron pli longa, la historio de mondo estus tute alia.

SAINT-BEUVE.

Inter du virinoj povas ekzisti vera amikeco, nur kiam unu el ili estas maljuna aŭ malbela.

SAINT-PROSPER.

Homo ne trovas ripozon sur la tero: por ĝin trovi estas necese meti teron sur homon.

SELLES.

Kolektis kaj esperantigis, V. INGLADA.

ANONCOJ

Abato Geo Laiguel, en la kolegio Saint-Vincent, Montdidier, Somme (France).
Deziras korespondi kun hispanaj esperantistoj.

Belajn poŝtkartojn kun granda portreto de D-ro Zamenhof ĵus eldonis firmo
Esperanto Verlag Moller kaj Borel, Prinzenstrasse, 95, Berlin.

La kosto estas: 10 ekz. 1 fr. apankite en ĉiuj landoj.
50 » 3'75 frj. » » »

Ni ilin varme rekomendas al niaj legantoj.

S-ro Alberto Theron, deziras korespondi kun geesperantistoj hispanaj per ilustritaj poŝtkartoj. Adreso: A. Theron. M.^{al} de Logis, depot de Remonte, Caen (Calvados), France.

La Revuo—Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D.^{ro} ZAMENHOF.—Ĉe J. Espasa, eldonisto, 579, calle de las Cortes, Barcelona.—Jare: Ptoj 7.

INTERNACIA MARISTA EKSPOZICIO.—En 1907, okazos en Bordeaux granda *Internacia marista ekspozicio*. La grupo esperantista de Bordeaux deziras aranĝi esperantan sekcion kaj petas ĉiujn societojn, grupojn kaj individuojn, sendi al ĝi por tio ĉiuspecajn, dokumentojn kaj propagandilojn (libroj, cirkuleroj, afiŝoj, poŝtkartoj kaj objektoj kun la marko *Esperanto*).

Por sciigoj oni sin turnu al S-ro Bignié, 66 cours Gambetta, en Talence (Gironde), aŭ al S-ro Sam. Meyer, ŝipmakleristo en La Rochelle.

HOTELO DE L'BORYSTHENE, *rue de Vaugirard, 30*, antaŭ Luxembourg kaj Palais du Senat, Parizo. Apartamentoj kaj ĉambroj meblitaj. Moderaj prezoj. Loĝejo rekomendata de multaj esperantistoj. Oni parolas Esperante.—Mastro: *E. Houbart*.

MALKARAJ AFIŜOJ INTERNACIAJ POR PROPAGANDO.—La Grupo de Versailles ĵus eldonis la propagandajn afiŝojn (en formo de 62 × 21 cmj. banderoloj) redaktitajn nur en Esperanto.

La vorto «ESPERANTO» per grandaj literoj altiras de malproksime la rigardon. Sub ĝi estas presita la konata frazo: «*Simpla, fleksebla, belsona, vere internacia en siaj elementoj, la lingvo Esperanto prezentas, ktp...*» tre taŭga per montri specimenon facile kompreneblan de nia lingvo.

Tiuj afiŝoj estos certe bonegaj propagandiloj, kaj tre taŭgos por vekii intereson al Esperanto, aŭ ĝin periode reveki, precipe antaŭ anonco de parolado aŭ malfermo de de kurso.

50 ekzempleroj. 1 fr. 00 afrankite 1 fr. 25
100 » 1 fr. 75 » 2 fr. 20

Sendu mendojn al S-ro Corret, sekretario de l' Grupo, 12, *rue de Vergennes* Versailles (Seine-et-Oise). France.